

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

Pozoblanco (Kordovo)

35-a Jarkolekto - Marto 2021 - N-ro 120



Oktobero / Decembro 2020

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
P. 05 Orson Welles por ĉiam en Andaluzio.
P. 09 Omaĝe al Rejna Manescau.
P. 12 Lingva Angulo:
Los dobles léxicos.
P. 18 Nuntempa vortaro:
Marsaj veturiloj
P. 19 Poezia Angulo
P. 20 Folioj por Praktikado
P. 25 Rakonto:
La kazo de la malklera tatuisto.
P. 30 Turismi en ...
Pozoblanco (Kordovo)
P. 33 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio:
Ajo Allinger 1933, kontraŭnazio en Andaluzio.
P. 38 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
Marso en Andaluzio.
P. 40 Flamenko
Carmen Linares.
P. 42 Fervojista angulo
Fervojo submara inter Eŭropo kaj Afriko.
P. 45 Andaluzia kuirarto
Verdaj fazeoloj laŭ andaluzia stilo.
P. 46 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio:
Macías la enamiĝanta.
P. 48 Vorto-ludoj
Krucvorto kaj Rebuso
P. 50 Humuro

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante
COLABORADORES:
Vicente Herrera Cobo
Juan García del Río
Daniel A. Musagüi
Lukas Toczki

*Sur la kovrilo:
Preĝejo Sankta Katerino en Pozoblanco (Kordovo).*

ESPERANTO EN ANDALUZIO

KUNVENO DE LA ESTRARO DE SEVILA ESPERANTO-ASOCIO

La pasintan 9-an de aprilo la estraro de Sevilla Esperanto-Asocio renkontiĝis per retkunvena sesio. Oni pritraktis dudekon da aferoj, inter kiuj oni devas substreki la agadplanon rilate la organizadon de kursoj por la venonta monato septembro, kiam espereble denove povos okazi kursoj en la Domo de la Sirenoj.

Oni ankaŭ planis la kontaktojn kun la sevila urbodomo kaj aliaj gravaj kulturaj centronj por okazigi prelegojn kaj ekspoziciojn pri la internacia lingvo.

Inter tiuj prelegoj oni proponis klerigan paroladon pri Esperanto, lingvo kaj movado, en la Ateneo de Sevilo, sendube la plej elstara kultura centro en la urbo. Same, oni proponis la okazigon de prelego pri Blas Infante kaj Esperanto kunlabore kun la Fondaĵo “Blas Infante”. Oni sciigis, ke la venontan 12-an de oktobro 2021, la movado en Sevilo atingos siajn unuajn 110 jarojn da ekzisto, do, estus konvene organizi renkontiĝon de la sevila esperantistaro por festi tiun daton. Fine oni parolis pri la eblo aĉeti malgrandan oficejon kiu povus utili kiel sidejo de la asocio kaj kiel deponejo de la biblioteko de la asocio.

Se vi loĝas en Sevilo kaj vi deziras kunlabori en la disvastigo de la internacia lingvo en tiu urbo kaj provinco, ne hezitu kontakti kun Sevilla Esperanto-Asocio.

www.esperantosevilla.org

info@esperantosevilla.org



NOVA NUMERO DE LA REVUO *VENTO*

Komence de la monato aprilo aperis la 8-a numero de la revuo *VENTO*. Temas pri la sola revuo en esperanto kiu pritraktas flag-sciencajn temojn.

La revuo estas eldonata en Andaluzio, kunlabore con Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La redaktoroj de la revuo en ĉi tiu lasta numero prezentas raporton pri la flagoj flirtigitaj dum la protestoj kontraŭ la puĉo en la azia ŝtato Birmo. Ankaŭ ampleksa studo pri la flagoj de internaci-lingvaj movadoj. Oni sciigas ankaŭ sur ĉi tiu 8-a numero pri la demarŝoj por fondi internacian asocion de esperantistoj kiuj ŝatas veksilologiajn (flagsciencajn) aferojn.



La revuo estas libere legebla ĉe la adreso:

www.esperanto/ac.vento

Ni diskonigas la andaluzian kulturon tra la tuta mondo.

Vizitu nian TTT-paĝon: www.esperanto.ac





Orson Welles por ĉiam en Andaluzio

Orson Welles estis usona aktoro kaj reĝisoro, verdire li estis unu el la plej gravaj filmistoj de la kino-historio. Lia plej konata filmo estas “*Citizen Kane*” (1941) (“Civitano Kane”), ĝi estas konsiderata kiel majstro-verko de la kinematografio. Orson Welles mondfamis kiam en la jaro 1933 en novjorka radiostacio, adaptis en radia programo la verkon de H.G. Wells “*La Milito de la Mondo*”. Li genie prezentis ĝin kaj multaj aŭskultantoj vere kredis, ke eksterteranoj el planedo Marso ekatakis la Teron.

paralelojn al sia propra vivo, la senkonvenciaj eksperimentoj pri sonoj, kameraumado kaj filmotondado igis kritikantojn paroli pri majstro-verko. Do, dum jaroj “*Citizen Kane*” estas sur la unua loko de la listo de la plej gravaj usonaj filmoj.

Je sia 17-a vivo-jaro Orson Welles vojaĝis tra Eŭropo dank'al mono ricevita post la morto de sia patro. Li venis en Hispanion, ĝuste al la urbo Sevilo, tiam komenciĝis am-rilato inter la usona aktoro kaj nia lando.

En la jaro 1938, okaze de radio-programo de Orson Welles, centoj da aŭskultantoj pensis, ke marsanoj ekinvadis nian planedon.

Mondfamon Welles gajnis pro la filmo “*Citizen Kane*” al kiu li kontribuis kiel scenejisto, aktoro kaj reĝisoro. Kvankam la filmo ne portis grandan financon profiton kaj eĉ estis bojkotata de la eldonisto William Randolph Hearst, kiu en la filmo vidis

En Hispanio li reĝisoris filmojn “*Chimes at Midnight*” -1965- (“Sonoriloj je la noktomezo”), “*Don Quixote*” -ne elfarita- (“Don Kiĥoto”) kaj “*Mister Arkadin*” - 1955- (Sinjoro Arkadin). En Hispanio la pentristoj Goya kaj Velázquez, la figuro de Don

Kihoto kaj hispanaj kutimoj kiel la taŭroludado entuziasmigis lin. Li havis bonajn amikojn en Hispanio, tiel la taŭrludistoj Antonio Ordoñez kaj Luis Miguel Dominguín.

Orson Wells forpasis 70-jaraĝa en Losanĝeleso, Kalifornio, Usono, en la jaro 1985. Unuamomente la cindroj de la usona reĝisoro restis en oficejo de lia filino Beatrice. En la jaro 1987,



Orson Welles kaj la taŭroludisto Antonio Ordoñez

Fine de la 5-a jardeko li traveturis Hispanion kune kun sia edzino, la itala aktorino Paola Mori. Per sia malgranda kamerao li ellaboris serion de dokument-filmoj. Okaze de intervjuo li sciigis, ke li deziris resti por ĉiam en Hispanio. Tiam li diris, ke homo ne apartenas reale al la loko kie li naskiĝis sed vere al tiu loko kie li elektas resti post sia morto.

Kiel reĝisoro aŭ aktoro, foje eĉ ambaŭ, li partoprenis en pli ol sesdeko da filmoj, pro tio en la jaro 1971 li atingis honoran Oskar-premion.

ŝi kaj aliaj du filoj de Orson Welles decidis plenumi lian peton rilate lian porĉiaman ripozon en Hispanio. Beatrice Welles transportis la cindrojn en Hispanion ene de la valizo uzita de lia patro dum liaj vojaĝoj. La familio elektis la ruran bienon “*El Recreo de San Cayetano*” en la urbo Arundo (hispane Ronda), kies proprietulo estis la taŭroludisto Antonio Ordoñez, iama bonega amiko de Orson Welles. Temas pri loko kiun ade vizitis la usona reĝisoro dum la 5-a kaj 6-a jardekoj de la pasinta jarcento.

La ceremonio estis privata kaj ĉeestis nur familianoj de Orson Welles kaj de la familio Ordoñez.

Hodiaŭ kaj por ĉiam la restaĵoj de unu el la plej gravaj homoj en la kina historio ripozas en la andaluzia urbo Arundo.

En la jaro 2015 tiu urbo dediĉis al li monumenton kiu tekstas jene:
“Arundo al Orson Welles. Homo ne apartenas al la loko kie li naskiĝis, sed al tiu kie li elektis por morti. Li elektis Arundon, li deziris esti plia arundano por ĉiam. Liaj cindroj restas ĉi tie en la Vilao San Cayetano por eterne.”

Monumento al Orson Welles en Arundo



Puto kie troviĝas la cindroj de la usona aktoro kaj promenejo al li dediĉita en Arundo.



ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac

Jara kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2021.



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac

Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2021

Omaĝe al Rejna Manescau

Andaluzia Pentristo



Tiu ĉi artikoleto estas mia omaĝo al pentristo, kies verkaron mi ekkonis antaŭ multaj jaroj, kaj kiun mi konsideras unu el miaj plej ŝatatajn artistojn. Temas pri Antonio Rejna Manescau (hispanlingve: Reyna). Tiu elstara pentristo naskiĝis en la malaga vilaĝo *Coín* (elparolu: Koin') en 1859, kaj mortis en Romo, komence de 1937. Lia familio apartenis al altnivela socia rango. Fakte, kelkaj el siaj familianoj estis urbestroj de la vilaĝo Coín.

Dum junaĝo li montris sian talenton kiel desegniston kaj pentriston, kaj li komencis studi tiujn artojn en la Altlernejo pri Belartoj de Malago. Tre baldaŭ, en 1882, la Malaga Provinca Deputitejo subtenis lin per stipendio, do li povis iri en Romon (Italio) por daŭrigi sian studadon pri belartoj.



Jen unu el la multaj verkoj kiujn li dediĉis al Venecio.

Depost tiu jaro, Rejna Manescau loĝadis kaj vivadis en Romo. Li eĉ edziĝis al itala opera kantistino. Tiel, grava parto de lia verkaro estas dediĉita al priitaliaj motivoj, ĉefe al Venecio. Pro tio, li estas konata kiel “la privenecia pentristo”, pro siaj multaj pentraĵoj faritaj surbaze de ties pejzaĝoj. Tamen, direndas ke, iom ofte, li vojaĝis al sia denaska regiono, kaj ke li neniam forgesis sian originon



Antikva bildo kie aperas “La Floralia”,
malaperinta dum la milito 1936-39

Menciendas la pentraĵo titolita *La Floralia*, kiu estis prezentita en la Hispana Nacia Ekspozicio de 1887, kaj al kiu oni aljuĝis elstaran medalon. De tiu momento, la renomo de Rejna Manescau kreskis senĉese dum la postaj jaroj. Bedaŭrinde, *La Floralia* perdiĝis dum la Hispana Intercivitana Milito (1936-1939), kaj neniam plu estas retrovita. Bonŝance, kelkaj antikvaj fotoj kaj gravuraĵoj ebligas nin vidi kia estis tiu pentraĵo.

Lia plej fama pentraĵo nomiĝas *Rancho Andaluz*, kiun li ekigis dum somera restado en sia denaska vilaĝo en 1910, kaj kiu estis prezentata dum Internacia Ekspozicio en Romo en 1911, ĉe la hispana pavilono. En tiu verko tre bone videblas la vivmaniero de kamparaj homoj de Andaluzio, kaj kiom li sopiris sian denaskan regionon. *Rancho Andaluz* “Andaluzia Ranĉo” estas nuntempe ekspoziciita en la vilaĝo Koina urbodomo, kune kun aliaj liaj verkoj.



Andaluzia Ranĉo (1911)

Direndas ke fine de 2019 estas inaŭgurita la Centro *Antonio Reyna Manescau*, muzeo kreita kaj subvenciata de la Koina urbodomo. Tiu muzeo enhavas multajn artistajojn kaj personajn objektojn rilatajn al tiu universala andaluzia artisto.



Centro-muzeo A. Reyna Manescau, en Coín

Juan García del Río





En este artículo vamos a tratar una cuestión importante respecto al vocabulario del esperanto, a saber: los dobles de palabras (duopoj vortaraj), también llamados dobles léxicos (duopoj leksikaj). Precisamente, en el nombre en esperanto ya vemos un doblete: vortara – leksika; ambas palabras significan básicamente lo mismo («relativo al vocabulario de una lengua»), pero una está derivada a partir de una palabra anterior (vort/ar/a, de vort/o) y la otra está tomada directamente como palabra entera (leksik/a). Veamos pues en profundidad en qué consisten estos dobles de palabras.

Cuando acudimos al Fundamento del Esperanto, vemos que la regla 15ª dice del siguiente modo:

«Las llamadas palabras «extranjeras», o sea, aquellas que la mayoría de los idiomas tomaron de una fuente, son usadas en el idioma internacional sin cambios, recibiendo únicamente la ortografía de este idioma; pero en algunas palabras que tienen una raíz común es mejor usar solamente la palabra básica sin cambios y las demás, formarlas a partir de aquélla de acuerdo a las reglas del idioma internacional. Por ejemplo: teatr/o (teatro), pero teatr/a, (teatral), no *teatral/a), etc.»

Esta regla es muy importante para entender la configuración del vocabulario en esperanto. A lo largo de su historia, el esperanto se ha adaptado a numerosos ámbitos específicos (matemática, biología, geografía, jurisdicción, lingüística, política, astronomía, teología, etc.) y la comunidad ha tenido por tanto la necesidad de importar vocabulario ingente para expresar todos esos nuevos conceptos e ideas. Sin embargo, esto entra en aparente contradicción con la

prescripción de que el esperanto ha de ser una lengua sencilla y reducida, neutra y lógica, fácil de entender; si se aumenta el vocabulario demasiado, el tiempo requerido para aprenderlo también aumenta y ello supone una dificultad. Como podemos ver, se trata de una cuestión de primera magnitud.

Ejemplo regla 15^a Fundamento de Esperanto

Fax es una palabra usada internacionalmente. Pasa al esperanto pero adoptando su ortografía, *ks* en vez de *x*, así como sus terminaciones: “o” para sustantivo, “i” para infinitivo, “e” para adverbio... de este modo:

Fakso: texto o dibujo enviado por fax.

Faksi: enviar por medio de un fax.

Evidentemente, no se puede reducir el léxico de la lengua internacional a un vocabulario estrecho y minimista, a partir del cual los hablantes tuviesen que deducir el resto de vocablos. Las palabras no se generan arbitrariamente, sino que tienen un trasfondo histórico, nos permiten descubrir situaciones «vividias» efectivamente por los hombres. Por ejemplo: la palabra «evolución» viene del verbo latino *evolvere* («desenvolver», «desenrollar»), ya que en principio designaba la acción de desenvolver un rollo de pergamino, a lo largo del cual se veía el «desarrollo» de unos escritos o unas ideas. En esperanto podríamos componer la palabra del mismo modo: *elvolvi* significa «desenvolver», así que *elvolvo* sería «evolución». Sin embargo, parece imposible que un hablante común llegue a esa conclusión: será mucho más fácil decir directamente *evoluo* o *evolucio*, tomando la palabra directamente como préstamo en vez de derivarla de otra.

El doblete léxico en esperanto se compone siempre de dos palabras: una que se ha derivado o compuesto a partir de una raíz preexistente, que llamaremos patrimonial; y otra que se ha tomado prestada de una raíz nueva e íntegra dentro del vocabulario, que llamaremos culta. Ambas palabras tendrían en principio el mismo significado, pero la patrimonial siempre sería más literal y obvia, mientras que la culta se toma para un significado más distinguido y selecto. De este modo, *elvolvo* significa en general acción de desenvolver algo, desenrollamiento, y por extensión *evolucio*; pero *evoluo* significa exclusivamente *evolucio* como sucesión de cambios (*evoluo de la bestoj*, *evolucio de los animales*; parece

En ocasiones, en un doblete léxico el término patrimonial se acaba imponiendo al culto, por gracia de la costumbre y de la literatura. Es el caso de eldoni («editar», «publicar»), compuesto de el- («hacia fuera», indica noción de salir o sacar algo) y doni («dar»), que se impuso a un inusitado préstamo *editi. Sí que persiste el doblete derivado eldonisto - editoro («editor», el que edita), pero si seguimos la regla 15ª del *Fundamento del Esperanto*, sería preferible decir eldonisto.

La razón de esto es que eldoni es un calco léxico del alemán herausgeben, de mismo significado, con los componentes heraus- («hacia fuera», como el esperanto el-) y geben («dar»). Sin embargo, lo que muchos no saben es que la misma palabra alemana es a su vez un calco léxico del latín edere, formado por e- («hacia fuera», como el-) y dare («dar»), que dio nuestra palabra «editar».

Es decir, tomar préstamos directamente de otros idiomas no es la única manera de componer nuevo vocabulario, sino que existen otros: el calco (imitar una palabra traduciendo sus componentes literalmente, como eldoni del alemán herausgeben), la acuñación (darle un nuevo significado a una palabra ya existente) o la creación (inventar una nueva palabra, como mojosa). Para todo ello, el esperanto no carece de recursos, ni mucho menos.

Ejemplo de doblete léxico

- Eldonisto: *editor* “origen léxico patrimonial E-o”
- Editoro: *editor* “origen léxico culto de otro idioma”

Ambos términos tienen el mismo significado

Una vez que hemos explicado toda la teoría, vamos a la parte práctica. Los dobletes léxicos en esperanto no sólo existen en muchos ámbitos, sino que además pueden «crearse» fácilmente. Simplemente necesitamos una palabra patrimonial (PA), que se conforma de otra mediante los afijos y compuestos de la lengua internacional; y otra culta (CU), que se toma generalmente del latín, del griego, o de algún otro idioma reconocido. Veamos diversos ejemplos usando sufijos:

- Para decir «fácil» (que se hace con poco esfuerzo), tenemos farinda (far/ind/a, PA) o facila (facil/a, CU). La primera viene de fari («hacer») con el sufijo -inda (hacedero, meritorio, que vale la pena). La segunda está tomada de la raíz


latina *facilis*, que viene precisamente de *facere* («hacer»). En este caso, *farinda* y *facilis* son análogas, pues están formadas sobre el mismo verbo (*fari* – *facere*, «hacer») y con un sufijo similar (*-inda* – *-ilis*, «factible», «meritorio»).

- Para decir «rápido» (que tarda poco en llegar), tenemos *hastema* (*hast/em/a*, PA) o *rapida* (*rapid/a*, CU). La primera viene de *hasti* («ir con prisa», «apresurarse») con el sufijo *-ema* (propenso, proclive, tendente a hacer algo). La segunda viene de la raíz latina *rapidus*.



- Para decir «sorprender» (tomar desprevenido), tenemos *mirigi* (*mir/ig/i*, PA) o *surprizi* (*surpriz/i*, CU). La primera viene de *miri* («admirar», «estar asombrado») con el sufijo *-igi* (causar, provocar, producir a alguien un estado). La segunda proviene del francés *surpris* (español sorpresa). Si hiciéramos un calco léxico de la palabra francesa, tendríamos *surpreni* (lit. «tomar por encima»).
- Para decir «ciencia» (saber objetivo y verificable), tenemos *scienco* (*sci/ec/o*, PA) o *scienco* (*scienc/a*, CU). La primera viene de *scii* («saber») con el sufijo *-eco* (esencia, objeto abstracto, idea). La segunda viene de la raíz latina *scientia*, formado por el verbo *sciere* («saber») y el sufijo *-entia*.
- Para decir «chispa» (partícula encendida), tenemos *fajrero* (*fajr/er/o*, PA) o *sparko* (*spark/o*, CU). La primera viene de *fajro* («fuego») con el sufijo *-ero* (componente, partícula, elemento), es decir, partícula de fuego. La segunda viene directamente del inglés *spark*.
- Para decir «regalo» (cosa dada, obsequio), tenemos *donajo* (*don/aĵ/o*, PA) o *donaco* (*donac/o*, CU). La primera viene de *doni* («dar») con el sufijo *-aĵo* (cosa, producto, efecto), es decir, cosa dada. La segunda viene del italiano *donazione*, que es «donación», de *donare* («dar»).

Como podemos ver, la gran variedad de sufijos disponibles en esperanto permiten elaborar palabras nuevas de formas ingeniosas sin recurrir siempre a un préstamo culto. Sin embargo, no son el único recurso que tiene la lengua internacional: existen también los prefijos y los compuestos.



Con los prefijos podemos añadir numerosos matices y precisiones a las palabras, especialmente con los verbos, que pueden cubrir (pero no sustituir) muchos dobletes léxicos cultos. Así, por ejemplo, con *fari* («hacer»), podemos obtener *perfari* («hacer a través», «hacer todo el proceso», «hacer del todo»), completar, conseguir, perfeccionar, refinar; este verbo podría equivaler a otros más cultos como *perfektigi*, *kompletigi*, etcétera.

Aquí tendríamos entonces casos de tripletes, cuádrupletes, quintupletes, etc. léxicos. Por ejemplo: tomemos el verbo *kunesti*, formado por *kun-* («junto con») y *esti* («ser», «estar»), que en principio significaría «ser junto» o «estar juntos». En la práctica, por analogía, este verbo puede equivaler a los cultos *kosti* («costar») y *konsisti* («consistir»). ¿Cómo?

— Puede significar «costar» en contextos como: *kiom kunestas ĉi tio?*, lit. «¿cuánto es esto (todo) junto?», es decir, cuánto cuesta, cuánto vale, cuánto es su precio, etc. Así se puede contestar: *ĉi tio kunestas tri eŭroj*, «esto (todo) junto son tres euros», cuesta tres euros. Eso es porque «costar» viene del latín *constare*, que significa también en origen «estar juntos», co-estar.

— Puede significar «consistir» o en frases como: *ĉi tiu libro kunestas je dek partoj*, lit. «este libro está junto a partir de diez partes», este libro consiste en diez partes, consta de diez partes, etc. Esto es porque «consistir» (y también «constar») significan igualmente en principio «estar juntos», en este caso las partes del libro que están juntas para conformar el propio libro.

Vemos aquí que tenemos un triplete léxico (triopo vortara): kunesti, kosti, konsisti, en el que la primera palabra puede cubrir (parcial o totalmente) el significado más o menos literal de las otras dos. Sin embargo, habrá hablantes que no querrán esa primera opción. Nosotros mismos, al hablar español, no nos paramos a pensar que «consistir» viene del latín y que significa «estar junto»; simplemente usamos la palabra tal como la hemos heredado. Del mismo modo se hace en esperanto con konsisti, es una palabra presente en muchos idiomas y los hablantes la entienden rápidamente.

Entonces, ¿cómo podemos resolver los dobletes léxicos? Realmente, no se puede. La condición de lengua internacional y neutral del esperanto impide que se puedan prescindir de unas u otras palabras; simplemente se usará aquello que sea más eficaz o más cómodo. Al fin y al cabo, el tiempo que se invierte en aprender todo ese vocabulario «culto» de memoria podría ser el mismo (o quizá más) que se invierte en aprender cómo componer nuevas palabras con afijos y analogías léxicas. Tal vez es más rápido (al menos, para los hispanohablantes) aprender que konsisti significa «consistir» y no que kunesti significa «estar junto(s)» pero también puede ser «consistir». Y sin embargo, si se usase sólo kunesti se reduciría el número de lexemas que aprender.

Como podrá comprobar el lector, la polémica está servida. Al final será el uso de los hablantes el que determinará qué vocabulario prevalece en esperanto, y la cuestión es que ese uso está condicionado por factores ajenos al propio esperanto, que dependen de nuestros idiomas nativos, de su historia y su etimología. Sin embargo, por lo expuesto en el presente artículo, se puede sacar en claro que los esperantistas debemos esmerarnos en conocer mejor las posibilidades de composición y derivación que ofrece el esperanto; algo que podemos tratar en próximos artículos.





Daniela Musagüi
hosabullo@hotmail.es



NUNTEMPA VORTARO

MARSAJ VETURILOJ. El nia planedo oni jam sendis 5 veturilojn por esplori la ruĝan planedon. Tiuj du lastaj (*Perseverance* kaj *Ingenuity*) surmarsiĝis antaŭ kelkaj semajnoj.



POEZIA

ANGULO



Fernando de Herrera
Sevilo, 1534 - 1597

Nur de okuloj mildaj kaj serenaj
pleniĝas mia kor' kaj miaj pensoj,
nur pri beleco zorgas miaj sensoj
kaŭzo de miaj maltrankviloj ĝenaj.

Nur logas al mi helo el am' plena
al vent' ĵetitaj en orfaskaj densoj,
nur venas al mi el grandec' kompenso
al la turment' kaj am' riĉig-kortrenaj.

Aŭskulti voĉon aŭ alian amon
mi tute ne intencas nek sopiras,
ĉar ne ekzistas gloro pli valora.

Se sciis mi, ke perdi mian damon
signifas perdi ŝin se mi foriras
lasu min Di' sen amo tiom vora!

*En esperanton tradukis
Antonio Marco Botella*



DO YOU
SPEAK
ENGLISH?

Folioj por Praktikado

La **avantaĝo** paroli **angle**

Lastatempe **mi bonŝancas** multe vojaĝi en Eŭropo pro mia laboro. Mi estas usonano, kaj tial mia amiko en Germanio diris al mi, ke mi havas avantaĝon, ĉar mi jam **denaske** parolas en tiu lingvo, kiu estas la plej proksima al io konsiderebla kiel internacia lingvo: la angla. Mi supozas, ke li pravas; tamen, mi tute ne deziras havi tiun avantaĝon.

Mi estas civitano de Usono, kaj **mi fieras pri tio**. Mi fieras ankaŭ pri tio, ke nia lando estas tre grava **en la hodiaŭa mondo**. Tio, pri kio mi ne estas fiera, estas la maniero, per kiu ni subtenas tiun gravecon. Temas ĉi tie pri la uzado de la angla lingvo kiel internacia komunikilo. Mi havas avantaĝon. Ni, usonanoj, havas avantaĝon. Ni estas la elito, ni regas tra la tuta mondo, kaj **ni plu regos**, ĉar ili, la ceteraj povos komunikiĝi **tiel bone kiel ni**. Ili devas lerni internacian komunikiĝon **dum jaroj, eĉ jardekoj**. Ili atingos nian nivelon neniam.

La **alilingvuloj**? Ili ofte pensas, ke ili perfekte uzas nian lingvon, sed, inter ni, ni kaŝe komentas kaj **ŝercas pri** liaj eraroj. Mi volas kriegi al ili: “ĉu vi ne kapablas vidi, kion vi faras? Estas vi mem, kiuj forigas vian povon komunikiĝi! Estas vi, kiuj daŭre metas nin **super vin**.” Kaj super ili ni restos. Ni estas la elito kaj ni regas la mondon.

Mi ne deziras esti elito. **Jen ĉi tie** estas usonano, **kiu ne emas** esti mondreganto. Mi estas civitano de Usono, sed super tio -jes, super tio- mi estas civitano de la mondo. **Homoj ĉieaj, mi rigardas vin kiel geamikojn kaj eĉ**

kiel gefratojn. Mi ne volas stari super vi pro maljusta avantaĝo. Mi multe pli ĝuus marŝi apud vi. Tiel ni povus kundividi niajn kulturojn. Tiel ni povus esti

egaluloj. Tiel ni povus respekti **unu la alian.**

Den Drown.

El la libro “Vojaĝo en Esperanto-lando” de Boris Kolker.

> **Avantaĝo paroli**

Muy pocas preposiciones se pueden colocar delante del infinitivo y desde luego “*de*” no es una de ellas. En español es habitual su uso en expresiones como “estoy cansado de andar”, “es una buena oportunidad de trabajar”, “me alegro de conocerte”. En esperanto no se coloca la preposición “*de*” delante del verbo, por lo que para traducir esas frases desde el español al idioma internacional, tan solo tendremos que usar el infinitivo y nada más. Así, el ejemplo que aparece en la frase “*la avantaĝo paroli angle*” podríamos traducirlo como “*la ventaja DE hablar en inglés*”.

> **mi bonŝanco**

En esperanto tenemos mucha libertad para crear palabras partiendo de otras ya existentes. Así del sustantivo “bonŝanco” (buena suerte), podemos crear el verbo “bonŝanci”(tener buena suerte). Para eso tan solo tendremos que sustituir la terminación “o” del sustantivo, por la “i” del infinitivo. Así que “bonŝanci” significaría “tener buena suerte”.

> **denaske**

En esperanto el adverbio da mucho juego. En español a veces tenemos que usar una locución, es decir un conjunto de dos o más palabras que funcionan como una unidad. En esperanto esa locución se sustituye simplemente con un adverbio, que siempre termina en la letra “e”. Así, “*denaske*” sería “*desde el nacimiento*”, igualmente en el título del artículo habrás visto el adverbio “*angle*”: “*en inglés*”.

> **mi fieras pri tio**

El régimen preposicional de algunos verbos en esperanto no tiene por qué coincidir con el del español, así que hay que tener cuidado con las traducciones y no hacerlas de manera literal. En esperanto el verbo “*fieri*” significa “*estar orgulloso*”, en español usaríamos tras ese verbo la preposición “*de*”: yo estoy orgulloso de algo. Sin embargo en esperanto usaremos la preposición “*pri*”. *Mi fieras pri tio: yo estoy orgulloso de eso.*

> en la hodiaŭa mondo

Como hemos indicado anteriormente el esperanto nos da mucha libertad a la hora de usar e incluso de crear palabras. Tan solo es necesario usar bien las desinencias finales, recuerda “o” para sustantivos, “a” para adjetivos, “e” para adverbios, “i” para el infinitivo del verbo, etc. Así que cualquier palabra podemos añadirle la terminación “a” y ya contamos con un adjetivo. Observa el ejemplo que se propone: “*en la hodiaŭa mondo*”: “*en el mundo de hoy*”. Hemos creado a partir del adverbio de tiempo “*hodiaŭ*” el adjetivo “*hodiaŭa*”. ¿Te atreves a decir “*el mundo de mañana*”? Exacto: *la morgaŭa mondo*.

> ni plu regos

En español si decimos la frase “*yo no quiero estudiar más*”, tan solo gracias al contexto podremos averiguar si queremos decir que no queremos estudiar más cosas o no queremos estudiar durante más tiempo. En esperanto tenemos una palabra diferente para cada idea. Si nos referimos a cantidad de cosas, usaremos “*pli*”; si por el contrario queremos decir “más tiempo”, usaremos “*plu*”. Así que el ejemplo que se propone se traduce como “*nosotros nos impondremos más tiempo*”.

> tiel bone kiel ni

Recuerda el comparativo “*tan...como*”, en esperanto decimos “*tiel...kiel*”.

> dum jaroj, eĉ jardekoj

“*Eĉ*” se traduce por “incluso”. En el ejemplo que se propone la traducción sería: “*durante años, incluso decenios*”.

> alilingvuloj

Los sufijos y los prefijos en esperanto nos dan mucha libertad para crear palabras. Recuerda el sufijo “*ul*”, que se utiliza para indicar un individuo que se caracteriza por aquello que se indica en la raíz. En el presente ejemplo la raíz sería “*alilingv*”, que a su vez está formada por dos palabras “*alia*” (otro) y “*lingvo*” (lengua). Así que “*alilingvuloj*” se traduciría como “individuos de otras lenguas”.

> ŝercas pri

Hemos visto anteriormente el régimen preposicional del verbo “*fieri*” (estar orgulloso). En este caso, el verbo “*ŝerci*” (reírse, mofarse) necesita de la preposición “*pri*” para indicar el objeto del que alguien se ríe.

> **super vin**

En español la preposición “sobre” no distingue si hay contacto físico entre los objetos que se superponen. Así, decimos igualmente “*el libro está sobre la mesa*” y “*el avión vuela sobre la ciudad*”. Recuerda que en esperanto sí contamos con preposiciones distintas para ambas situaciones. La preposición “*sur*” indica que hay un contacto físico: “*la libro estas sur la tablo*”, mientras que “*super*” indica que no hay ese contacto: “*la aviadilo flugas super la urbo*”. En el ejemplo que se propone además se utiliza el acusativo de dirección en el pronombre “*vin*”, por lo que se da idea de movimiento. Así, se traduciría “sobre vosotros” pero indicando también un movimiento para que se produzca esa situación.

> **Jen ĉi tie**

“Jen” por sí mismo ya indica que algo o alguien está aquí, en este lugar. “Jen usonano” significaría “He aquí un estadounidense”, pero el autor en esta ocasión ha querido remarcar la idea de estar aquí presente, así que además añade “ĉi tie” (aquí).

> **kiu ne emas**

Ya hemos hablado antes de la importancia en esperanto de los sufijos y los prefijos. Estas terminaciones se emplean para formar nuevas palabras a partir de una raíz, ej. del verbo “*babili*” (charlar) obtendríamos “*babilema*”, adjetivo para caracterizar a alguien que tiene tendencia a charlar (charlatán). Pero no solo creamos nuevas palabras añadiéndole un sufijo, sino que en sí mismo el sufijo puede ser una nueva palabra. Ej. “*em*”, de este sufijo que indica que se tiene tendencia a algo, podemos derivar el verbo “*emi*” (tener tendencia a algo). Así “*kiu ne emas*” se podría traducir como “el cual no tiene tendencia a”, “el cual no es propenso a”.

> **Homoj ĉieaj**

Hemos dicho ya en varias ocasiones que las terminaciones son esenciales a la hora de usar el esperanto. Para indicar que una palabra actúa como adjetivo simplemente le añadimos una “*a*”, así de “*ĉie*”, cuyo significado es “todos lados”, obtendremos el adjetivo “*ĉiea*”, con la traducción “de todos lados”. “*Homoj ĉieaj*” podría traducirse como “hombres de todos los lugares”.

> mi rigardas vin kiel geamikojn kaj eĉ kiel gefratojn

La traducción sería “yo os contemplo como amigos e incluso como hermanos”. El uso del acusativo en “*geamikojn*” y “*gefratojn*” ya nos indica que se refiere a quien también va en acusativo en esa oración “*vin*” (a vosotros).

> egaluloj

Ya hemos visto anteriormente el sufijo “*ul*” con el significado de “individuo que se caracteriza por lo que se indique en la raíz”. En este caso la raíz es “*egal*” (igual), así que “*egaluloj*” significaría “personas que son iguales”, “los semejantes”.

> unu la alian

Se traduce por “uno al otro”. Es un correlativo muy fácil de aprender. Ej. “*Amu unu la aliajn*” (Amaos los unos a los otros); “*La sportistoj rapide ĵetis la pilkon unu la alian*” (Los jugadores se pasaron la pelota rápidamente el uno al otro).



La kazo de la malklera tatuisto



Silentu! Silentu! - la juĝisto ekkriis kaj li samtempe marteladis brue sur la tablon.

- *Se la ĉeestantoj ne respektas ĉi tiun tribunalon, mi devige forpelos ĉiujn el la salono - li minacis. Pedelo, estu atenta kaj notu la nomojn de tiuj kiuj denove krios.*

La juĝisto metis siajn manojn sur sian frunton. Supozeble ĉi-matene okazus rapida kaj simpla proceso, tamen la juĝota kazo komplikis lian laboron. Terura kapdoloro ekaperis.

- *Nu, akuzito, sciigu al mi trankvile kaj detale kial vi pugno-batis la tatuiston. Ĉu vi scias, ke via bato rompis al li kelkajn dentojn?* - la juĝisto demandis kolereme.

- *Jes, tion mi scias, Sinjoro juĝisto - akceptis la akuzito - tamen, mi opinias, ke li meritis tiun punon kaj mi nun klarigos al vi la kialon.*

La akuzito daŭre parolis: - *Antaŭ kelkaj monatoj mi ekrilatis kun fremda knabino. Ŝi studas ĉi tie nian lingvon. En la komenco ni promenadis nur sabate vespere, sed post kelkaj semajnoj ni parolis ĉiutage per Whatsapp. Ŝi ŝatis babili en nia lingvo, krome ŝi parolas perfekte la anglan kaj esperanton.*

- *Ho! Ĉu vere?*- demandis la juĝisto - *Ĉu ankoraŭ ekzistas tiu lingvo?*

- *Jes ja! Pli ol unu miliono da homoj parolas ĝin en la tuta mondo. Temas pri tre simpla kaj facila lingvo, se tio interesas al via moŝto, mi povas havigi al vi libron-* respondis rapide la akuzito kvazaŭ komisiisto.

- Ne, ne! Ne estas necese diskonigi ĝin ĉi tie, daŭrigu vian rakontadon pri tio kio okazis- vigle respondis la juĝisto.

- Antaŭ kelkaj tagoj mia koramikino petis al mi plenumi am-pruvon - li diris - Ŝi bezonis scii, ke mi amas ŝin ĝis-oste kaj por ĉiam.

- Do, vi donacis al ŝi ringon, ĉu ne? - demandis la juĝisto.

- Ho, tute ne! Ringoj povas esti perditaj -klarigis la akuzito -Mi deziris ion eternan kaj post kelkaj sekundoj mi trovis solvon. Tatuoj daŭras la tutan vivon. Do, mi kontaktis kun tatuisto, la plej bona laboranta en la urbo, oni diris al mi. Mi rakontis al li miajn dezirojn. Unue desegni jino-jangan simbolon, kiu reprezentas la eternan unuiĝon kaj mi ankaŭ deziris aperigi simplan frazon por montri mian amon. Ĉar mia koramikino parolas esperanton mi proponis al tatuisto kelkajn frazojn, sed li certigis al mi, ke li povus serĉi simplan sed belan frazon en esperanto en intereto.

- Ĉu li trovis tian frazon? - demandis la juĝisto.

- Vidu, vidu vi mem tion kion li trovis! - ĝuste tiam la akuzito refaldis siajn manikojn ĝis la kubuto, tiam aperis antaŭ jino-janga simbolo simpla frazo:

“Mi amas vi”



-Via moŝto, ĉu vi vidas ĝin? Ĉu vi povas legi ĝin? - angore demandis la akuzito.

- Jes, mi vidas la tatuadon. Kion signifas tiu frazo? - demandis la juĝisto.

- Jen la afero, sinjoro juĝisto. Ĉi tiu frazo signifas nenion! - La akuzito ekploris senkonsole.

- Kiam mi montris mian nudan brakon al mia koramikino ŝi ekploris -diris la akuzito inter larmoj.- Unuamomente mi pensis, ke tio ŝuldiĝis al emocio kaj plenĝojo. Tamen ne, ŝi ploris pro malfeliĉo. Ŝi diris al mi, ke “mi amas vi”

signifas nenion.

- *Mi komprenas tute nenion* - la juĝisto susuris, dum la kapdoloro pli-akutiĝis. - *Kaj pro tio vi pugno-batis poste al la tatuisto?*



- *Jes sinjoro* - respondis la akuzito. - *Kiam mia koramikino legis la tatuafon, ŝi rifuzis min. Ŝi demandis al mi, ĉu mi estis tute certa pri mia amo al ŝi. Kompreneble mi kap-jesis kaj mi denove montris mian brakon. Tiam ŝi demandis al mi: "Kiun vi amas? Vi amas neniun!"*.

Poste, ŝi klarigis al mi, ke mankas en tiu frazo la homo kiu ricevas la agon ami. Do, la tatuisto forgesis aperigi la akuzativon. Neniu estas amata per tiu deklaro. Tiam, ŝi forkuris kaj ŝi jam ne deziras revidi min - la akuzito jam ne kapablis paroli plu.

- *Mildiable! Ĉu tiu eraro estas tiel grava? Mi, ne scipovanta la lingvon, tamen komprenas perfekte, ke "mi amas vi" povas signifi, ke vi estas amata de mi* - la juĝisto pruvis klarigi.

- *Mi protestas* -la defendanto ekkriis stare - *La juĝisto ne rajtas traduki lingvon kiun li ne komprenas.*

- *Nu, sendube vi pravas* -la juĝisto admisiis. - *Nu, venigu la knabinon-* li ordonis.

Tiam, malfermiĝis la pordegoj de la granda salono. Eniris bela knabino akompanita de policano. Ĉiuj rigardis ŝin atente sed silente, ĝis kiam ŝi stariĝis antaŭ la juĝisto.

- Nu, bonan matenon, Sinjorino - ekdiris la juĝisto. - Mi deziras demandi al vi kelkajn aferojn pri la tatuado montrita de via fianĉo.

- Ve! Li ne estas mia fianĉo, eĉ ne mia koramikino. Li ne amas min. Eble li amas iun, sed mi ne scias kiun. - La junulino fiere respondis.

La manoj de la juĝisto palpis sian frunton - Nu, respondu fidele kaj detale jenajn demandojn. Kion vi komprenis kiam vi vidis la tatuadon de via fianĉo.. de tiu homo? -Li, lastmomente korektis la frazon.

- Mi sentis grandan tristecon. Li diris, ke li amis, sed ne kiun li amis... -ploreme respondis la junulino.

- Tamen, ĉu vi ne komprenis, ke li amis vin? Temas pri tre facila frazo kun ege simpla strukturo. "Mi" estas la subjekto; "amas" la verbo kaj fine "vi" agadas kiel objekto. La ordo de la vortoj ja montras ties funkcion sur la frazo. - Nur mankis skrib-tabulo kaj la juĝisto estus profesoro en tiu momento.



- Ne, sinjoro. Eble tion vi povas kompreni, tamen en mia patrin-lingvo la ordo estas tute kontraŭa. Unue aperas la objekto, poste la verbo kaj fine la subjekto. -La junulino klarigis. - Do, tiu frazo ankaŭ povas esti komprenata kiel ordono "Vi amu min". Neniel li diris, ke mi estas amata de li. Verŝajne pro la fakto, ke li neniam amis MIN. - La junulino substrekis laŭte la lastan vorton kaj la akuzativon oni aŭskultis eĉ ekster la granda salono.

La kapdoloro de lia moŝto povus esti sentata eĉ de la publiko. Tiam li diris: - Nu sinjorino, mi daŭre komprenas, ke "vi" povas esti "vin".

- Tion vi pensas -respondis la junulino, -sed "vi" estas "vi" kaj "vin" estas "vin", tio ja estas eterna vero.

La juĝisto ruĝiĝis, verdire li malmulte sciis pri gramatikaj aferoj.

- Nu, la akuzito revenu denove antaŭ mi -li ordonis.

Forviŝinte siajn larmojn li denove stariĝis antaŭ la juĝisto.

Nu, mi volas scii, kion vi sentis post kompreni la sencon aŭ ne-sencon de la frazo. - La juĝisto demandis.

La akuzito rapide respondis. -Bone, mi tuj deziris korekti la eraron, do mi iris en la tatu-vendejon kaj mi petis al la tatuisto aldoni literon "n" post "vi". Tiam li diris al mi, ke tio tute ne eblis, ĉar la jino-janga simbolo situis apud la fino de la frazo kaj ne estis eble adicii pliajn literojn al tiu frazo.

- Kaj tiam vi pugno-batis la tatuiston, ĉu ne? -kuriozeme demandis la juĝisto.

- Ho, ne vere tiam -respondis la akuzito. - Tio okazis poste, kiam la tatuisto diris al mi, ke ebla solvo al la problemo povus esti fortranĉi mian brakon.

- Eble tio povus esti taŭga solvo -la juĝisto flustris. En tiu momento li ekpensis pri la redaktota verdikto.

Esperanto ponto inter popoloj



Nova Ponto en Arundo

Turismi en ...

Pozoblanco (Kordova)

Pozoblanco estas la ĉefurbo, el la ekonomia kaj administracia vidpunkto, de la Pedroĉ-Valo, en la nordo de la kordova provinco, tie kie Andaluzio limas Ekstremaduron kaj La Manĉon.

Kvankam oni trovis kelkajn restaĵojn de la neolitika periodo kaj eĉ kelkajn dolmenojn, verdire la originoj de Pozoblano troviĝas en la 14-a jarcento. Al tiu loko alvenis ofte paŝtistoj de apudaj vilaĝoj por trinkigi la ŝafaron ĉirkaŭ akvo-plena puto. Pro la fakto ke tiuj putoj fabrikitaj el briko estis blanke farbitaj, tiu loko estis

konata kiel “Blanka Puto” (*Pozoblanco* en la hispana lingvo). Tiel naskiĝis la nomo de ĉi tiu vilaĝo.

En la jaro 1478 la katolikaj gereĝoj koncesiis juran titolon al la vilaĝo. Dum la Mezepoko Pozoblanco estis vilaĝo kiu aniĝis en komunumo kun pliaj ses vilaĝoj, la tiel nomataj “Sep vilaĝoj de la Pedroĉ-Valo”, kies plej grava ekonomia resurso estis la brutobredado.

En la jaro 1836 tiu komunumo malaperis kaj la komunaj farmobienoj estis disdonataj al tiuj vilaĝoj. En la jaro 1923 la hispana reĝo koncesiis al Pozoblanco la titolon kiel urbon. La hispana intercivilitana milito, inter la jaroj 1936 kaj 1939, estis terura en la Pedroĉ-Valo, pro la fakto, ke ambaŭ armeoj, respublikana kaj naciista, celis konkeri la urbon pere de akraj kombatoj. Tiel, en la jaro 1937 okazis la batalo de Pozoblanco, tiam la respublikana armeo daŭre konservis la urbon ĝis la fino de la milito.

Nuntempe Pozoblanco estas la plej grava urbo en la nordo de la kordova provinco. Tie oni starigis regionan hospitalon kaj la urbo enriĉiĝis dank’al la entrepreno COVAP, kiu produktas

*Blazono de
Pozoblanco*



grandan kvanton da lakto kaj porkaĵoj disvenditaj en la tuta Andaluzio.

Monumentoj

Preĝejo Sankta Katerino

Oni komencis ties konstruon dum la 16-a jarcento, sed finigita jam en la 19-a. Tre damaĝita dum la intercivitana milito, post tiu okazintaĵo oni rekonstruis ĝin.

Teatro El Silo

En la jaro 2006 oni transformis tiun antikvan silon en grandan teatron. Tie de tempo al tempo estas eble spekti ĉiuspecajn spektaklojn.



Festoj

La plej konata festo en Pozoblanco estas la pilgrimado de la Virgulino de la Luno. Ĝi estas organizata kune kun la apuda vilaĝo Villanueva de Córdoba, pro la fakto, ke la preĝejo troviĝas meze de ambaŭ vilaĝoj.



La ekonomia riĉeco de Pozoblanco rilate la bruto-bredadon estas konata en la tuta lando. Tiel, oni organizas specialan foiron por prezenti la plej modernajn teknikaĵojn en ĉi tiu industrio, kompreneble ankaŭ por diskonigi la kvaliton de la naturaj produktoj de Pozoblanco kaj de la tuta Pedro-ĉ-valo.



Pri la Virgulino de la Luno ekzistas tutreala kaj belega rakonto. Fine de la 6-a jardeko la Kunfrataro de la Virgulino de la Luno en Pozoblanco kontaktis kun la usona NASA (Nacia Aeronautika kaj Spaca Administracio). La kunfrataro sendis

al la astronautoj de la Apollo 11-a malgrandan bildon de la Virgulino por protekti ilin dum la unua vojaĝo en nian sateliton. Dankeme NASA sendis al la kunfrataro fotografajo subskribita de la astronautoj. La foto nun estas videbla en la preĝejo piede de la religia figuro de la Virgulino de la Luno.



Gastronomio

Per la altkvalitaj krudaj materialoj de Pozoblanco, ĉefe porkaĵo, oni kuiras bongustajn manĝaĵojn. Tiel, ne nur estas mondfamaj la sinkoj de Pozoblanco sed ĝenerale ĉiuj produktoj el porko, kiel kolbaso, salamo, porko-dorsaĵo, sango-kolbaso, ktp.

Bongusta ankaŭ estas la porka abomaso fritita kun ajloj kaj la rostitaj paneroj, temas pri la manĝaĵo de la antikvaj paŝtistoj.

Rilate dolĉaĵojn, famaj estas la *pelusos* kaj la *perrunas*, tipaj desertoj dum kristnaskaj festoj. Fine sci, ke se vi trovas en via vendejo lakton COVAP, sci, ke ĝi devenas el Pozoblanco.

Fotografajo de la tri astronautoj de Apollo 11-a piede de la religia bildo de la Virgulino de la Luno en Pozoblanco.

Venont-numere

Turismi en ...

Zahara de la Sierra
(Kadizo)



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Ajo Allinger 1933, kontraŭnazio en Andaluzio

Josef Alois Allinger, konata kiel *Ajo Allinger*, naskiĝis en la germana urbo Karlsruho en la jaro 1904. Infanaĝe li suferis la unuan mond-militon, lia urbo, grava industria centro, troviĝis apud la franca landlimo, pro tio okazis teruraj aviadil-bombardadoj meze de la jaro 1915. Ajo Allinger asertis, ke 80 infanoj mortis dum tiuj atakoj. Sendube ĉi tiuj okazintaĵoj kortuŝis la infanan Ajo, kiu, de tiam, kondamnis ĉiujn militojn kaj sopiris pri unuigita homaro.

Sendube tiuj pensoj kondukis lin al internacia lingvo esperanto kaj ties movado. Allinger estis unu el la unuaj instruistoj de esperanto diplomita laŭ la Cseh-metodo. Temas pri metodo por instrui esperanton al diversnacia kaj diverslingva publiko, pro tio, ke la instruisto ne bezonas koni la denaskan lingvon de la lernantoj, li povas instrui esperanton al homoj parolantaj malsaman lingvon ol la profesoro. Do, en la jaro 1931 Ajo Allinger iris al Danio, tie li prelegis kaj instruis esperanton je propraj kostoj, ekzemple, en la jaro 1931 li instruis la internacian lingvon al policanoj en



Josef Alois Allinger

la urbo Kolding. Dum tiuj jaroj li vizitis kaj propagandis la internacian lingvon tra la tuta Danio: Sønderborg, Lunderskov, Kolding, Aarhus, Alborg kaj Randers. Li eĉ organizis seminarion por profesoroj de la Cseh-metodo en la urbo Silkeborg en la jaro 1932, kun la partopreno de trideko da profesoroj de Skandinavio kaj Germanio.

Dum tiuj jaroj en Germanio, la nazia partio kaj ties reganto, Adolf Hitler, ekkonkeris politikajn postenojn.

El la politika vidpunkto Ajo Allinger estis socialisto kaj ĝis-osta kontraŭnazio, li, malgraŭ esti pacisto kaj vegetarano, iufoje deklaris jenon: *“Mi ne manĝas viandon, tamen se iu preparas surplade la kapon de Hitler, mi voros ĝin !”*

elstara esperantisto Francisko Azorín Izquierdo, kiu ofte ĉeestis socialismajn E-renkontiĝojn en Eŭropo, invitis lin veni en Hispanion por prelegi kaj instrui Esperanton. S-ro Azorín, tiam socialista deputito en la parlamento, atingis ke Hispana Esperanto-Asocio



Kurso de esperanto al policanoj en la dana urbo Kolding organizita de Ajo Allinger en la jaro 1931

Kelkajn jarojn poste, en Norvegio, ĝuste antaŭ la ekigo de la dua mondmilito, Allinger diris: *“Hitler deziras komenci militon, en Germanio ni travivas malbonajn tempojn, ĉiuj eklernas defili infanaĝe”*. En la jaro 1933 la germana prezidento nomis Adolf Hitler kiel regnan kancelieron (ĉefministro), komenciĝis tiam la nazia regado de Germanio kaj Allinger decidis ne reveni en sian landon por savi sian vivon.

asignu al Ajo Allinger mon-helpon de 500 pesetoj, por helpi la situacion de la germana propagandisto kiu faris en nia lando grandan laboron.

Tiel, la 1-an de Februaro 1933 Ajo Allinger prelegis en la andaluzia urbo Kordovo, okaze de la komenco de nova kurso organizita de la loka grupo ĉe la Gimnazio. Ajo Allinger prelegis en Esperanton kaj la paroladon tradukis S-ro Azorín. Li parolis pri la taŭgeco de internacia neŭtrala lingvo. Certe li konis detale la politikan vivon en Germanio, ĉar li asertis, ke nova milito en Eŭropo estus la detruo de la

34 Post Danio, en la jaro 1933, Ajo Allinger venis en Andaluzion. Tutcerte la kordova socialisto kaj

Un cursillo de esperanto en Córdoba



En el Instituto de Segunda enseñanza de Córdoba se ha inaugurado el cursillo de Esperanto, estando la primera lección a cargo del profesor Allinger. El acto fué presidido por el vicedirector del Instituto y el Grupo Esperantista cordobés

Ĵurnaloj informis pri la kurso de esperanto en Kordovo, tie prelegis okaze de la unua sesio *Ajo Allinger* en la jaro 1933

nuntempa civilizacio. Post Kordovo Allinger iris en Malagon, tie li estis en la monato majo 1933 okaze de kurso organizita de Serafin Baudín, lernejdirektoro en Malago kaj motoro de la E-movado en ĉi tiu andaluzia urbo.

Post Hispanio Ajo Allinger iris en Skandinavion, unue al Norvegio kaj poste al Svedio. En tiu landoj li organizis oftajn kursojn dank'al la apogo ricevita en laboristaj medioj. Li ankaŭ kunlaboris kun la naturisma movado, nuntempe li estas konsiderata kiel unu el la ĉefaj organizantoj de la unuaj naturistaj kluboj en la skandinavaj landoj.

Dum tiuj jaroj Allinger loĝis somere en tendo, meze de la kamparo kaj dum la fridaj nordaj vintroj ĉe modesta ĉambro en laborista kvartalo. Li asertis, ke malmulte li bezonis por vivi, do por li sufiĉis malgrandaj monkvantoj havigitaj de tiuj kiuj organizis la kursojn.

Malgraŭ ĉi tiu idealismo Allinger estis efika propagandisto kaj organizanto. Liaj lernantoj difinis lin kiel *“idealano esperantoinstruiston”* kaj *“ĉarman preleganton, kiu scias entuziasmigi la aŭskultantojn”*. Anekdote oni povas rakonti, ke apud li ĉiam vojaĝis tajp-maŝinon, per ĝi Allinger redaktis informilojn,

lecionojn, artikolojn kaj afiŝojn por la kursoj. Iu ŝtelis tiun tajpilon, kiun li lasis senzorge ene de la tendo, post scii tion la lernantoj rapide kolektis sufiĉe da mono por aĉeti alian novan.

Li ankaŭ pritraktis en siaj artikoloj dum tiuj jaroj, la neceson reveni en la Naturon. Ajo Allinger kaj Leontine Spedicati divorcis en la jaro 1944. En la jaro 1949 li forlasis Eŭropon kaj



Kurso de esperanto organizita de Ajo Allinger en la norvega urbo Østfold (1935)

En la jaro 1936 Ajo Allinger iris al Svedio, en la urbo Stokolmo li konis junulinon, Leontine Spedicati, svedino ital-devena, ili geedziĝis. Kiam la dua mond-milito eksplodis en la jaro 1939, Svedio deklaris sin neŭtrala ŝtato. Malgraŭ tio Allinger ĉiam malkonfidis pri tiu situacio, ĉar li estis konata kontraŭnazio.

Dum tiuj militaj jaroj li ofte kunlaboris en la revuo “*Malgranda Revuo*”, eldonita en Svedio. En siaj artikoloj Ajo Allinger parolis pri la neceso, post la fino de la milito, apogi pacifismjan idealoj, li skribis, ke estontece pac-rompuloj devus esti konsiderataj kiel deliktuloj.

elmigris en Brazilon, sendube lia amo al naturo instigis lin vojaĝi kaj fine resti en tiu granda sudamerikan lando.

J.M.R.H.



Historia Arĥivo de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
E-14080 Córdoba (Hispanio)

cordoba@esperanto.ac

Ĉu vi scias, ke la revuo KURIERO de Unesko ankaŭ aperas en la internacia lingvo Esperanto?



Elŝutu senpage bitversiojn ĉe <https://uea.org/revuoj>

Mendu apartajn ekzemplerojn paperforme ĉe la Libroservo:

<http://katalogo.uea.org> (tajpu en la serĉkampo “Unesko-Kuriero”).

Abono ĉe la Libroservo de UEA. Jarabono: 50 eŭrojn. La reta versio estas senpage.



$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

Marso en Andaluzio

En Riotinto, en la andaluzia provinco Onubo, disvolviĝas acida ekosistemo, tre simila al tiu kiun homoj trovos, kiam estos eble iri, en la planedo Marso. Tiel, geologio kaj mineraloj estas tre similaj en Riotinto kaj en tiu fora planedo, do, se vivo sukcesas en Riotinto pro la ekzisto de ekstremofiloj, ĉu estus eble trovi vivaĵojn en Marso?



Grundo en Riotinto (Onubo) kun abundo de fera mineralo

Por pristudi ĉi tiujn aferojn kaj ĝenerale por prepari ontan vojaĝon en la planedon Marson, efektiviĝis kelkaj programoj depost la jaro 2000 en tiu andaluzia vilaĝo.

Inter la jaroj 2003 kaj 2005 la NASA (Nacia Aeronautika kaj Spaca

Administracio), kunlabore kun la Hispana Instituto pri Aero-Spacaj Teknikoj, disvolvigas en la onuba provinco la projekton M.A.R.T.E. (Marsa Astrobiologia Esplorado kaj Teknologia Eksperimentado). Ĉi tiu projekto celas pristudi la vivon de ekstremofilaj organismoj. Ĉi lastaj estas tiuj plurĉelaj vivuloj kiuj viglas ene de ekstremaj kondiĉoj, kiuj estas malutilaj al plejmultaj vivuloj sur nia planedo.

Laŭdire, tiuj kondiĉoj ekzistantaj ĉirkaŭ la rivero Tinto en Onubo estas similaj al tiuj kiuj homoj povas trovi en la planedo Marso el la minerala kaj ĥemia vidpunkto. Tiel, laŭ asertis D-ro Amils Pibernat, de la Aŭtonoma Universitato de Madrido, *se Marso estas la fera planedo, Riotinto en Onubo estas fera rivero kaj pro tio estas eble aserti, ke ekosistemo bazita sur fera mineralo, troviĝanta en Onubo, povus ankaŭ disvolviĝi en la ruĝa planedo, almenaŭ kiam akvo fluis en la surfaco de Marso.*

Tiel, naskiĝis kelkaj sciencaj projektoj, inter ili “Moonwalk”, kies

celo estas testi ilaron kaj metodojn uzotajn kiam la homo alvenos en la ruĝan planedon, ĉefe la kompleksa sistemo el vestaĵoj, ekipaĵoj kaj vivtenaj sistemoj por ebligi la alvenon de homo en Marso.


En Riotinto (Onubo) oni testas ankaŭ la roboton YEMO, kiu helpas la astronautojn dum sia esplorado en Marso. Temas pri malgranda veturilo, ne pli granda ol hundo, kiu sekvos la ordonojn de homoj. Ĝi estos kapabla



La roboto YEMO akompanas astronauton ne en la planedo Marso sed en Riotinto (Onubo)

Estas necese diri, ke vojaĝo en Marson daŭrus 8 monatojn kaj kiam finfine homo povos piedpremi la planedon, li restos tie inter unu monato kaj tri jaroj. Do, longdaŭra testado de ekipaĵoj antaŭ ol organizi kosman vojaĝon estas nepra.

enmeti sin ene de malgrandaj lokoj kaj descendi tra deklivoj. Ĉi ĉio ja estus tre danĝera por la astronautoj, tiel komence de la 7-a jardeko astronauto decidis ne descendi fortan deklivon en la Luno, pro la timo faliĝi kaj ne reveni en la kosmo-ŝipon.



Ankaŭ oni testis la ilon LMAP-2017, temas pri bor-maŝino kapabla eniri unu metron enen de la marsa surfaco. Ĉi tiu ilo povas preni boraĵ-specimenojn ĉiu 20 centimetroj kaj havigi ilin al analizilo.

Bor-maŝino eble funkcionta en Marso estas nun taksata en Andaluzio.



Flamenko

Carmen Linares

Kvankam virinoj ne oftas en la flamenka kantado, preskaŭ ĉiuj ili estas legendoj. *La Niña de los Peines, Rita la Cantaora, Lole Montoya, Juana la de la Pipa, Bernarda kaj Fernanda de Utrera...* estas elstarindaj kantistinoj, kiuj ofte devis elekti inter familio kaj flamenko, inter edzo kaj publiko.

Carmen Linares estas unu el tiuj virinoj, kvankam feliĉe ŝi povis antaŭenirigi sian flamenkan karieron kiel kantistinon. Carmen Pacheco Rodríguez naskiĝis en Linares (Jaena provinco), el sia urbo ŝi prenis sian artan krom-nomon “Carmen Linares”. El la generacia vidpunkto, ŝi estis kunulino en la flamenka kantado de Camarón de la Isla, Tomatito, Paco de Lucía, Enrique Morente kaj José Mercé. Siafoje, ŝi mem estis apog-punkto por kelkaj aliaj pli junaj kantistoj, tiel Miguel Poveda, Marina Heredia, Arcángel kaj Estrella Morente.

Je sia 17-a vivojaro Carmen iris en Madridon, tie ŝi konis kaj kantis kun la tiutempe plej konataj kantistoj, tiel Pepe el de la Matrona, Fosforito kaj Juan Varea. Apud ili ŝi kantis en la flamenkaj spektaklejoj de Madrido. Komence de la 7-a jardeko Carmen



Carmen Linares

saltis el malgrandaj flamenkaj spektaklejoj en teatrojn kaj koncert-salonojn.

Unu el la plej elstarindaj flankoj de Carmen Linares estas ŝia serĉado pri novaj manieroj enirigi la flamenkon en aliajn muzikajn spektaklojn. Tiel, ŝi kantis apud simfoniaj orkestroj, ekz. en Novjorko, tiam sur la ĵurnalo “*The New York Times*” oni skribis, ke temis pri kantistino kun eksteordinara esprimiva povo. Ŝi partoprenis ankaŭ en surbendigo de diskoj por omaĝi hispanajn poetojn kiel Federico García Lorca, Juan Ramón Jiménez aŭ Miguel Hernández. Temas, do, pri

flamenka kantado kunloĝanta kun aliaj kulturaj spektakloj.

Carmen Linares posedas voĉon plena je tonoj kaj koloroj, kun propra stilo kiu helpas sian espriman forton. En la jaro 2020 ŝi festis sian 40-an datrevenon kiel profesia kantistino. Tiam, ŝi organizis spektaklon kun la nomo “*Cantaora, 40 años de flamenco*” (Kantistino, 40 jaroj da flamenko).

En tiu koncerto Carmen Linares ludis ne nur la plej purajn flamenkajn kantaĵojn, sed ankaŭ verkojn de la poeto Federico García Lorca.

Dum tiuj 40 jaroj oni devas elstarigi la fakton, ke ĝis hodiaŭ, ŝi estas la ununura flamenka kantistino kiu atingis oficialan nacian premion pri muziko en Hispanio.

*Se vi kredas, ke vi elstaras
vizitu tuj tombejon,
tie vi komprenos,
ke mond' nur estas
eta ter-peco.*

*Eĉ ne dum dormo
ripozas miaj pensoj,
ĉar mi havas daŭran
suferon daŭran,
kiu ĵus eniris en mian korpon
kaŭze de via am'.*





Fervojistaj Angulo

Fervojo submara inter Eŭropo kaj Afriko

La ideo unuigi Eŭropon kaj Afrikon pere de ponto aŭ tunelo en la Ĝibraltara Markolo estas revo de antaŭ multaj jarcentoj. Tamen, la apero de fervojo en la 19-a jarcento antaŭenigis tiun ideon kaj tiel la franca Charles de Villedeuil proponis la konstruon de submara tunelo en la jaro 1869. Tiam, kaj ankaŭ laŭ postaj projektoj de la jaroj 1906, 1919 kaj 1929, oni akceptis, ke la plej taŭga ideo estis la konstruo de tunelo, do oni rifuzis la ideon pri ponto, pro la fakto, ke ponto kaŭzus gravajn problemojn al la senĉesa ŝip-trafiko ĉe la markolo.

Fine de la 7-a jardeko de la pasinta jarcento, Hispanio kaj Maroko akordis krei komitatojn por pristudi la eblon konstrui tiun tunelon. Verŝajne la projekto pleje realigebla estas tunelo kun ekstremoj en la maroka kabo Malabata apud Tanĝero kaj kabo Paloma, proksime al Tarifa en Hispanio.

Verdire, ne temas pri la plej mallonga distanco, entute estus 28 kilometroj, anstataŭ tiuj 14, kiu estas la plej mallonga distanco inter Eŭropo kaj Afriko, tamen la mar-profundo en



Du kontinentoj el satelita perspektivo

tiu linio estas apenaŭ 300 metroj. Ĉi tiu submara tunelo ne estus la unua konstruita en la mondo, jam ekzistas aliaj por komuniki Francion kaj Brition en la Manika Mar-kolo, same en Japanio troviĝas la tunelo Seikan. Tamen en ĉi tiuj lastaj tuneloj la mar-profundo ne estas tiel granda kiel en Ĝibraltaro, ekzemple en la Manika Mar-kolo la tunelo troviĝas nur je 174 metroj. Estas necese diri, ke la mar-premo pligrandiĝas laŭ la profundo, kaj tio sendube malfaciligas la konstruon de tunelo.

Oni konstruos ankaŭ 2 stacidomojn en ĉiu ekstremo de la tunelo kaj tie estos eble entrainigi aŭtomobilojn kaj kamionojn. La trajnoj povos atingi 120 km/h kaj supozeble la vojaĝo daŭros 30 minutojn. Rilate la trajnojn, oni pripensis uzi specialan trajnon por transporti aŭtomobilojn, kaj alian pli longa por kamionoj kaj aŭtobusoj. Verŝajne la trajnoj longiĝos ĝis 700 metroj.

Kiam la tuneloj estos konstruitaj?



Dezajno de la proponitaj tuneloj

La tunelo etendiĝos tra 38,7 kilometroj, el tiuj, 27,7 kuŝas sub la maro. Oni konstruos tri galeriojn, du por fervojoj, kun distanco 60 metroj inter ili, kaj la alia meze situata, kiel servo-galerio. Ĉiu 340 metroj ekzistas transversa koridoro por komuniki tiujn tri galeriojn.

Nu, Hispanio kaj Maroko jam eklaboris por redakti teknikajn studojn. En la jaro 2003 ambaŭ ŝtatoj jam akordis pri teknikaj aspektoj kaj oni kreis du oficejojn por ekigi la projekton. En Tarifo (Hispanio) oni traboris kelkajn zonojn por esplori tiean grundon.

Poste, en la jaro 2006, svisa kompanio proponis sin por realigi la projekton. Tamen, pro la malfacilaj geologiaj kondiĉoj, ĉar temas pri zono kie

abundas tertremoj, estos necesaj 15 jaroj por realigi la konstruon de la tunelo. Do, ne temas pri tunelo baldaŭ konstruota.

Skizo de la submara fervoja tunelo inter Eŭropo kaj Afriko.

Hispana Amikoj de Fervojistoj
Esperantistaj
fervojista@esperanto.ac



Gazeto Andaluzia
estas revuo malfermita al ĉiuj legantoj



Viaj opinioj kaj kontribuoj estas nepre necesaj.
Jen nia retadreso: cordoba@esperanto.ac



Andaluza Kuirarto

Verdaj fazeoloj laŭ andaluza stilo

Fazeolo estas genro el familio fabacoj, temas pri manĝebla amelhava legomo. Pri la origino de ĉi tiu planto, verŝajne ĝi devenas el Azio. En Hispanion fazeoloj eniris dum la 16-a jarcento. Temas pri legomo tre uzata en la andaluza gastronomio, ĉefe pro la fakto, ke ĝi bonege miksiĝas kun aliaj manĝaĵoj, ĉefe ovo aŭ ŝinko.

Hodiaŭ ni prezentos recepton de verdaj fazeoloj laŭ la andaluza stilo, kvankam kompreneble en ĉiu provinco, en ĉiu vilaĝo oni povas aldoni kelkajn pliajn manĝaĵojn por riĉigi tiujn bongustajn fazeolojn.



Bonan Apetiton !

Ingredientoj:

- Verdaj fazeoloj (1 kilogramo)
- Ruĝa kapsiko.
- 3 aŭ 4 ajleroj.
- Hieraŭa pano (2 tranĉaĵoj).
- Kumino (iomete).
- Vinagro (2 kuleregoj)
- Oliv-oleo - Salo

Kaj jen la preparado:

- 1) Ni purigas la verdajn fazeolojn surakve. Distranĉu ilin en pecojn.
- 2) Ni boligas ilin en akvo kun salo dum duon-horo. Post la boligo la legomoj devas esti malmolaj. Degutigu ilin.
- 3) Ene de poto verŝu iom da oliv-oleo. Fritu la ajlerojn kune kun la pano kaj la ruĝa kapsiko.
- 4) Enmetu la fritajon ene de elektrbatilo. Aldonu vinagron, iomete da akvo. Batu ĉion.
- 5) Ene de tiu kun oleo fritu la fazeolojn. Aldonu la bataĵon kaj iom da salo. Se necese aldonu ankaŭ iomete da akvo.
- 6) Kuiru ĉion dum dek minutoj.



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Macías la enamiĝanta

En belega kaj ĝuinda pejzaĝo, ne tre for de Andújar, troviĝas la vilaĝo Arjonilla. Tia etoso kaŝas tragikajn memorojn. Neniu forgesis la tristan historion pri la poeto, kiun ni ĉiuj konas, Macías la Enamiĝanta.

En la 15-a jarcento pli-malpli, en la hejmo de Henriko de Aragono, markizo de Villena kaj superulo de Calatrava, loĝis la juna Macías, poeto kaj servisto de la markizo. Havis la markizo tre belan filinon, kies nomo estas Estrella kaj kies beleco mirblindigis Macías-on. La du junuloj amis unu la alian, sed neniu povis diveni per iliaj mienoj la fajron, kiu estiĝis en iliaj koroj. La nuraj atestantoj de tia amo estis la floroj kaj la arboj de la ĝardeno. Ili sentis sin la plej feliĉaj homoj de la mondo, sed ili tute ne forgesis, ke la markizo havas la orgojlon kvazaŭ li estus monarĥo, konsekvence, ili la feliĉon kaŝis.

Macías estis nur paĝio. Li mem konsideris sin indigna obteni la manon de Estrella, ĉar ankoraŭ mankis al li la famo de batalanto, malgraŭ tio, ke li ja havas famon, sed de poeto. La volo de gloro ekposedis lin: li ekzercis sin ĉiutage pri ĉiaj armiloj kaj partoprenis

en turniroj. La amo de Estrella gvidis lin kaj baldaŭ li iĝis heroo. La markizo ne plu konsideris lin paĝio kaj nomis lin juna nobelo.

Sed ju pli li sin sentis feliĉa, des pli da surprizoj malagrablaj alvenis. Unu tagon post lia venko en la turniro, li iris al la arbaro kaj kuŝis pensante ĉe arbo. Tamen, neantaŭvideble alvenis kuriero el Jaeno, kiu konsilis al li, ke la amon li lasu for. Estrella edziniĝis kun la markizo de Porcuna laŭ la volo de sia patro.

La markizo nenion sciis pri la amo de sia filino kaj akceptis denove Macías-on en la palacon. Tamen, la edzo de Estrella ignoris Macías-on kaj evitis renkonti lin, eble pro timo Baldaŭ la feliĉo de la geedzoj fariĝis profunda aflikto. Tagojn kaj noktojn ili ploradis pro malĝojo kaj ade ĵuris ami unu la alian.

La edzo, malkuraĝa, malkovris la sekreton de la du geamantoj. Sed anstataŭ lukti vizaĝ-al-vizaĝe por lia honoro, la sekreton li diris al la markizo. Koleriĝante, la markizo punis Macías-on per puno eĉ pli kruela ol la morto: li enŝlosis la poeton

en turo de la kastelo. Kiel nura rimedo por lia konsolo, havis liliuton, kaj li kantis kaj kantadis kaj lia voĉo audiĝis en la tuta vilaĝo. La vilaĝanoj admiris lian voĉon kaj lin kompatis. Eĉ homoj ekster la vilaĝo alvenis por aŭskulti la sentoplenajn kantojn de la enprizonigita poeto!

Bedaŭrinde la legendo ne diras al ni kio okazis al Estrella. Macías estis entombigita en tre eta ermitejo. En lia tombo, oni gravuris jenajn vortojn:

«Ĉi tie kuŝas Macías la Enamiĝanta»



Lia famo iris ekster la limojn de la provinco kaj la memoron de tia poeto multaj generacioj konservis. La kantaĵoj estis korŝiraj kaj koleraj. En tiaj kantaĵoj la poeto malbenis lian amatulinon tial, ke li ne mortigis sin anstataŭ edziniĝi. Sed li ankaŭ sin malbenis pro ŝin kalumnii. Baldaŭ, tamen, alvenis la morto al Macías dumnokte. La morton alportis la markizo de Porcuna, kiu kolere pro ĵaluzo, la poeton mortigis per punardo. Neniu atestanto, sed ĉiuj perfekte sciis, kiu mortigis la poeton. Eĉ la markizo de Porcuna devis iri for pro ĉi tio.

Rakontas la vilaĝanoj de Arjonilla, ke ne ĉiam la tombo de nia kara poeto estas senhoma. Kelkfoje ili vidis ombron, kiu iris ĉe la tombon. Multaj kredas, ke la ombro estas la Amo, kiu ŝirmas lin. Aliaj kredas, ke estas la animo de lia amatulino Estrella kiu unuiĝis kun la animo de Macías la Enamiĝanta.

Fonto de la pentraĵo: <https://mallonge.net/c5> Pentraĵo: Suonatore di liuto, Caravaggio.

La teksto en la originala hispana troviĝas en la libro Leyendas de Andalucía, de la eldonejo Editorial Labor (1984).

Tradukis el la hispana: Alejandro Burgos Escalante.
Retpoŝtadreso: alejandroburgosescalanteabe@gmail.com

Vorto-Ludoj



Krucvorto

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B				■			
C							
Ĉ			■	★	■		
D							
E				■			
F							


HORIZONTALALE

- A. Mono ricevita
- B. Maljesi ■ (*Sen la lasta vokalo*) mallonga memoriga skribo.
- C. (*Akuzative*) Perdo de la kapablo paŝi, sen perturbo de la muskola forto.
- Ĉ. (*Inverse*) Sufikso sen difinita senco. ■ Artikolo.
- D. (*Akuzative*) Epopeo de Homero.
- E. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Ago de tiu kiu daŭre restas en loko. ■ Ekstreme.
- F. (*Inverse*) Veneno.

VERTIKALE

1. Eksento de fervora amo por iu.
2. (*Akuzative*) Amaso de densa vapora akvo.
3. Poseda pronomo. ■ Pronomo.
4. En la aŭtomobiloj de Portugalio. ■ La lasta. ■ La unua. ■ En la aŭtomobiloj de Svedio.
5. (*Inverse*) Malvire. ■ Numeralo.
6. Specialisto pri la scienco pri animaloj.
7. (*Inverse*) tiu kiu havas ion en la manoj.

Rebuso



La advokato specialiĝis pri _____

*Se vi kapablis solvi ĉi tiujn vorto-ludojn, sendu vian solvon al jena ret-adreso:
cordoba@esperanto.ac*

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO

	1	2	3	4	5	6	7
A	M	A	R	S	A	N	O
B	A	R	A		R	U	R
C	R	E	D	U	K	T	I
Ĉ	A		A	M	A		G
D	R	A	K	O	N	T	I
E	B	I	S		O	E	N
F	O	N	O		N	R	O

REBUSO

Kiujn bestojn vi vidis en Afriko? *Okapioj*

Sur la bildo aperas 8 (*ok*) *apioj*.

Do, *ok apioj*: okapioj.

HUMURO

**Retkunsidoj estas modernaj
spiritismaj sesioj**



- Ĉu estas iu kiu volas aliĝi ?
 - Lidja, ĉu vi estas tie?
- Ni ne povas aŭdi vin, ĉu vi aŭdas nin?

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



106-a Universala Kongreso de Esperanto

Belfasto
17 – 24 julio 2021



Pro la monda epidemio la Universala Kongreso en Belfasto estis nuligita. Anstataŭe okazos Virtuala Kongreso.
Pliaj informoj: <https://uea.org/gk/947>